**N I A  V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz
**DECEMBRO 2005**

En aparta folio ni inkludas, por nia membraro, la programon kaj la buĝeton por 2006

**FINFINE APERIS EN LA HISPANA LA BIOGRAFIO DE ZAMENHOF**

## "El hombre que desafió a Babel"

Hispana versio de la biografio de Zamenfof verkita de Masson/Centassi tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. La prezo de la libro estas 20 eŭroj sed por vendoj ĜIS DECEMBRO, Madrida Esperanto-Liceo havas grandan oferton:

po 23 eŭroj vi ricevos **"El hombre que desafió a Babel"** kaj **"Nuevo Método de Esperanto"**; la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

**ESPERANTO EN ANDALUZAJ UNIVERSITATOJ**

Laŭ informis ĵurnalo "Jaén" je la 29a Novembro, en la Popola Municipa Universitato de Jaén okazas kurso de Esperanto, gvidata de Jordi Liétor López, kiu ankaŭ instruas tie la germanan . La ĵurnalo tre favore priskribas nian lingvon. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo lanĉis la programon "Esperanto en la Universitato", kiu celas starigi kursojn de Esperanto en pluraj andaluzaj universitatoj. Kunordigas la projekton nia kara amiko José María Rodríguez Hernández, el Córdoba. Jam oni komencis demarŝojn por okazigi kursojn en la Universitatoj de Málaga , Huelva kaj Sevilla.

**INTERNACIA TELEVIDO EN ESPERANTO**

'Telewizja Polska' (TVP), grava ŝtata televidĉeno de Pollando, fariĝis partnero de Internacia Televido. La projekto ITV estis lanĉita de la teamo de la portalo Ĝangalo. Ĝi ebligos al la esperantista televidkanalo prezenti kelkajn el la plej bonaj filmoj, programoj kaj dokumentfilmoj produktitaj en Pollando lastatempe. Temas pri elstara atingo por Esperanto, kaj tre bona novaĵo por la spektantaro de ITV, kiu baldaŭ ĝuos la bonege faritajn programojn el Pollando, en la lingvo internacia.
La Internacia Televido en esperanto, estas rete videbla per rapidaj ADSL konektoj per jena ligilo:
http://internacia.tv/

**LA INFORMO GRIN REKOMENDAS ESPERANTON**

Profesoro François Grin, de la svisa Universitato de Ĝenevo, redaktis 127-paĝan informon pri la lingvaj problemoj en Eŭropa Unio, laŭ peto de franca institucio (Haut Conseil de l'Evaluation de l'Ecole). En tiu informo, Grin reliefigas la enormajn profitojn kiujn ricevas Britio kaj la anglalingvaj landoj pro la trudo de la angla lingvo al la ceteraj landoj kaj speciale al Eŭropa Unio: la cifero atingas 18.000 milionojn da eŭroj, pro la restado en Britio kaj anglalingvaj landoj de centmiloj da homoj por lerni la lingvon, kaj pro la eldono de libroj kaj produktoj ligitaj al la angla lingvo. Li rekomendas, kiel logika solvo, la uzon de Esperanto kiel eŭropa laborlingvo. Tiu interesega dokumento legeblas en sia franclingva originalo per:
http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf

**ESPERANTO EN AMASMEDIOJ**

La aŭtonoma televido de Madrido ·"Telemadrid" elsendis la programon "Toma nota" pri Esperanto. La raporto estis parte surbendigita dum la kunveno de Madrida Esperanto-Liceo ĉe HEF kaj estis longa, vigla, kaj tre bone farita. Unue aperis diversaj informoj, kiujn donis Manolo Parra kaj Toño del Barrio. Poste aperis Pedro Hernández, Alejandro, Lupe kaj Carmen, rakontante kiel ili lernis au por kio ili uzis la lingvon; tiuj estis en sinsekvaj "ekstraj planoj" , sed oni vigligis la scenon per mallongaj tranĉoj. La impreso estas tre pozitiva sed bedaŭrinde, la programo estas tre minoritata, kaj ĝi okazis je tre malfrua horo.

**4-A CENTJARIĜO DE "EL QUIJOTE"**

La kampanjo pri la disdonado, al bibliotekoj kaj oficialaj centroj pri dokumentado, de ekzempleroj de la esperanta versio de El Quijote daŭras ĝis la fino de decembro. Fundación Esperanto sendas senpage ekzemplerojn de la libro al E-grupoj aŭ respondeculoj.

Madrida Esperanto-Liceo donacis ĝin je la nomo de Fundación Esperanto al la Vietnama Esperanto-Asocio, kaj al la Biblioteko de Castilla-La Mancha en Toledo.

**NOVA ELDONO DE LIBRO DE DAVID GALADÍ-ENRÍQUEZ**

*Kosmo kaj ni, La, Galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo.* David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel, Scienco kaj tekniko, Fundación Esperanto, FEL, 2005 (2a eld). Unuafoje en Esperanto, kompleta manlibro pri teoria kaj praktika astronomio. Prezo: 18.00 EUR. Pliaj informoj, reta mendilo: http://katalogo.uea.org?inf=6428

**ASTURA ESPERANTO ASOCIO EN LA RETO**

Nova paĝaro de Astura Esperanto-Asocio, kun la revuo "Heleco" : http://uica.info/esperanto

**ĈINA ESPERANTISTINO VIZITOS MADRIDON**

Ĉina 20-jara esperantistino, kiu ĉeestas la kursojn de Augusto Casquero en Bydgoszcz, Pollando, vizitos Hispanion kaj konkrete Madridon dum la kristnaskaj festoj. Se iu madrida esperantist(in)o deziras gastigi ŝin, bonvolu urĝe retskribi al augustocasquero@hotmail.com

**ZAMENHOF TAGO**

15-a de decembro: Tago de la Esperanta Libro. Aĉetu, pruntu en biblioteko, au simple prenu el via libroteko… kaj legu libron en Esperanto!

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere en la sidejo de HEF, Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7, Madrido (18,30-20,30h); dum aliaj tagoj vi povas faksi au telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) au kontakti rete: admin@esperanto-es.net.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7
Tel. 91 446 80 79.

**BAZA KURSO DE ESPERANTO EN VALLECAS**

Senpaga E-kurso en la madrida kvartalo Vallecas. Gvidas Pedro Hernández. Sabate je 17.00 ekde monato Januaro, en Librería Muga, Avda. Pablo Neruda, 89, tel. 915079084 / 85. Konsilinde fari rezervon.

La membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid,
NOVA KONTO

Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730

Laŭ statutoj de MEL, en la venonta Ĝenerala Asembleo, kiu okazos en Januaro, oni eksigos la membrojn kiuj ŝuldas du jarojn.

## MADRIDA ESPERANTO-LICEO DEZIRAS AL VI FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN JARON 2006

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid

# PROGRAMA DE ACTIVIDADES PARA 2006

Esperanto-Liceo de Madrid
San Alejandro 6-4ºB.Ext. 28005 Madrid

A continuación se detallan las principales actividades que, para 2006 tiene programadas Esperanto-Liceo de Madrid (MEL).

## PUBLICACIONES

Mensualmente se editará el boletín informativo "Nia vocho" distribuyéndolo a todos los grupos esperantistas españoles. En él se reserva un espacio para difusión de noticias de la Federación Española de Esperanto al ser de periodicidad más frecuente que su revista informativa y dada la estrecha relación de la Federación, cuya sede está en Madrid, con Esperanto-Liceo de Madrid.

Los esperantistas madrileños seguirán con sus colaboraciones habituales en revistas internacionales editadas en Esperanto "Literatura foiro", "Monato", "Kajero el la sudo", "Boletín", "Sennaciulo", etc.

## CURSOS

En función de la demanda se continuará con la programación de cursos en diversos distritos de Madrid

El curso por correspondencia patrocinado por la Federación Española de Esperanto que contará con la tutoría de los profesores del Liceo.

## PARTICIPACION EN CONGRESOS Y REUNIONES

Esperanto-Liceo de Madrid estará representado por alguno de sus socios en diversos congresos y reuniones de Esperanto, tanto en España como en el extranjero.

La Asociación prestará su ayuda en la organización del 65º Congreso Español de Esperanto que tendrá lugar en Benicassim (Castellón).

## CONFERENCIAS

Diversos miembros del Liceo impartirán charlas divulgativas sobre la lengua internacional en centros culturales y locales sociales de Madrid y alrededores.

La Asociación organizará conferencias y/o proyecciones de videos o diapositivas comentadas en Esperanto, en especial aprovechando la estancia en Madrid de esperantistas extranjeros. El programa de 2006 incluirá una charla al mes, el programa provisional incluye las siguientes:

.- Nuestra España: Fiestas populares
.- Nuestra España: Cádiz

.- Nuestra España: Guadalajara
.- Avistamiento de aves
.- Conclusiones del Congreso Español de esperanto
.- Nuestro mundo: Vietnam
.- Madrid. Rincones insólitos

Dentro de las actividades como asociación vecinal del Ayuntamiento de Madrid, Esperanto-Liceo de Madrid patrocina la edición de una serie de conferencias audiovisuales que, con el título “Descubriendo Madrid” y realizadas por uno de sus socios, narran la la historia de Madrid desde sus orígenes hasta la actualidad. El objeto de estas conferencias-audiovisuales es impartirlas con fines didácticos en centros y asociaciones culturales.

## PARTICIPACION EN PRENSA Y RADIO

Esperanto Liceo de Madrid seguirá su labor de difusión de la lengua internacional enviando artículos y noticias a los diversos medios de comunicación.

Se dará especial importancia a la traducción de noticias, sobre el problema de la comunicación internacional, que aparecen en las revistas esperantistas y se insistirá en difundirlas en los medios de difusión nacionales y autonómicos

## OTRAS ACTIVIDADES

Se programarán visitas por diversos distritos y zonas de Madrid con comentarios en Esperanto.

Continuarán los intercambios y visitas de los socios con miembros de otros grupos de esperanto españoles y de otros países.

Tertulia semanal en esperanto en el local de la Federación Española de Esperanto.

Visitas culturales, excursiones y encuentros, abiertos a los miembros y simpatizantes se programarán en colaboración con grupos de esperanto de lugares próximos a Madrid.

Esperanto-Liceo de Madrid seguirá auspiciando al coro "Verda stelo", cuyos miembros han reiterado su apoyo a la difusión del esperanto a través de la música y de sus actuaciones en diversos centros.

Madrid diciembre 2005

La secretaria
Lupe Sanz Bueno

# P R E S U P U E S T O 2 0 0 6

**Esperanto Liceo de Madrid**
San Alejandro 6. 4ºB Ext. 28005 Madrid

## GASTOS

| concepto | euros |
|---|---|
| Compra Libros | 300,00 |
| Material oficina | 80,00 |
| Suscripción a revistas | 120,00 |
| Correo/paquetería | 200,00 |
| Cuotas asociaciones | 200,00 |
| Publicidad/propaganda | 300,00 |
| Regalo mercaderías | 130,00 |
| Boletín "Nia Voco" | 150,00 |
| Comisiones bancarias | 30,00 |
| Ayuda a Federación Esperanto | 150,00 |

**TOTAL GASTOS 1.660,00 EUROS**

## INGRESOS

| | |
|---|---|
| Libro "El hombre que desafió a Babel" | 800,00 |
| Venta Libros | 100,00 |
| Cuota socios | 400,00 |
| Otras ventas | 60,00 |
| Ingresos financieros | 300,00 |

**TOTAL INGRESOS 1.660,00 EUROS**

VºBº La presidenta El tesorero

Madrid diciembre de 2005